Laŭ artikoloj 1.7 kaj 1.8 de la Regularo pri Kunsidoj (KS) dum la ĉiujara SUS (laŭ instru-regularo 4.2) okazas kunvenoj de la Ĝenerala Asembleo (ĜA) kaj de la Subtena Sektoro (SubS). Laŭregule okazu

- la asembleo de la Subtena Sektoro je la tago de la inaŭguro, kaj
- la kunveno de la Ĝenerala Asembleo (de la Scienca Sektoro) je la tago de la ferma solenaĵo.

Ĉar SUS 35 okazas kadre de la Itala Kongreso de Esperanto, ĝi frontas kelkajn programajn restriktojn. AIS tial formale invitas ambaŭ kunvenojn al tempo post la inaŭguro

dimanĉon, 2018-08-19, 15h30, en salono Michelotti
(kongrescentro San Marino, v. J. F. Kennedy, 17)

Eble la unua decido estos prokrasti la kunvenojn al alia tempo.
Laŭ la kunsidregularo la tagordoj de la kunvenoj estas:

**Kunveno de la Asembleo de la SubS:**

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, kvorumeco, laborlingvoj, protokolo, tagordo, ĉeestrajto)
2. Ĝenerala raporto
3. Financa raporto, senŝarĝigo, AKU-kurzo
4. Decidoj pri proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 24 horojn antaŭe
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale antaŭe anoncitaj per invitletero aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1
6. Eventuale necesaj elektoj
7. Diversaĵoj.

**Ĝenerala Asembleo de la SciS:**

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, kvorumeco, protokolo, tagordo, ĉeestrajto)
2. Ĝenerala raporto de la senato
3. Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto
4. Decidoj pri proponoj de la senato kaj pri aliaj proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 72 horojn antaŭe kaj legeblaj en la SUS-oficejo almenaŭ 24 horojn antaŭe
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale antaŭe anoncitaj okaze de skriba kunvokado aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1
6. Eventuale necesaj elektoj
7. Diversaĵoj.

Noto: La sola laborlingvo de la ĜA estas ILo. Tial ne okazas decido pri laborlingvoj.